Tiu F.Fraga estis ĉeestinta la E-kongreson en Barcelono; ni menciis tion ke li salutis la kongresanaron kiel reprezentanto de la astura lingvo. Pri Alfredo Villa menciindas ke li estas la aŭtoro de unu el la kvar esperantlingvaj versioj de la himno de Asturio. Ĉiujn kvar versiojn oni povas vidi en la interreta paĝo de nia Asocio, konkrete en la subpaĝo kies adreso de aliro estas:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/asturias/asturland.html

La fakto ke tiam ekzistis du E-grupoj en urbo kiel Ĥiĥono, kiu ne estis granda (hodiaŭ estas multe pli granda kaj havas nur unu grupon, cetere sufiĉe malforta) estis signo de la vigleco kiun havis en tiu epoko la esperantista movado, sed estis signo ankaŭ de priideologiaj diferencoj, kiuj tiam gravis pli ol nuntempe. Ja, la anoj de **Astura Esperanta Asocio**, kreita du jarojn antaŭe, apartenis al la **Katolika Centro**, kies ideologio estis religiema, burĝklasa, politike dekstra aŭ centr-dekstra, dum la nova grupo, enkadrigita en la **Laborista Ateneo**, sin tenis laike, laboristklase kaj politike maldekstre. Sed spite al tiuj diferencoj, oni povas diri ke la membroj de ambaŭ grupoj estis progresemaj kaj tre fervoraj aktivuloj de la esperantismo kaj ties interna ideo.



Zamenhof kaj edzino kun esp-istoj en Bad-Kissingen



Kongresanaro en Antverpeno (1911)

En la jaro 1912 senhalte progresadis la hispana esperanta movado. Inter la hispanaj E-grupoj elstaris "**Frateco**" de Zaragozo, subgvide de la prestiĝa advokato Emilio Gastón. En Sabadell oni festis la 25-jaran jubileon de la naskiĝo de Esperanto per la inaŭguro de strato dediĉita al D-ro Zamenhof. Hodiaŭ ekzistas en la mondo multaj stratoj kiuj portas la nomon de la fondinto de Esperanto, sed tiu de Sabadell eble estis la unua el ĉiuj ili. La 8a universala E-kongreso estis en Krakovo (Polujo). La tiama parolado de Zamenhof finis per jenaj vortoj: ***kio estas la esenco de la esperantista ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron al interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta sed solena kaj profunda sento kaj ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.***

La tria kataluna esperanta kongreso de tiu jaro okazis en Tarrasa; organizis ĝin la grupo "Lumon" de tiu urbo. Kiel kutime, kadre de tiu kongreso estis la beletra konkurso "Floraj Ludoj".

La **Analoj** registras por tiu jaro 1912 la kreadon de nur unu nova esperantista grupo en nia lando, Ĝi nomiĝis **Blindula Esperanta Grupo**, kaj, jen surprizo: tiu grupo estis en nia urbo. Jen la teksto de la informo pri ĝi en la **Analoj**:

**Ĉe Laborista Ateneo de Gijón, oni fondis ĉi-jare Blindulan Esperantistan Grupon, probable la unua aŭ unu el la unuaj en la mondo kun tiu specifa karaktero. Ĝia Prezidanto estis S-ro Manuel Blanco Chico, kiu baldaŭ akiris grandan prestiĝon ĉar ĝi multe aktivis.**

Ankaŭ la jaro 1913 estis profitdona por la esperanta movado je ĉiu nivelo, kaj enlanda kaj internacia. Reaperis la revuo **LA SUNO HISPANA** post plurjara ĉeso kaj okazis en Ĝirona la 4a kongreso de Kataluna Esperanto-Federacio. La Universala Kongreso de Esperanto de tiu jaro okazis en Berno de la 24a al la 31a de aŭgusto. Ĉeestis ĝin hispana delegacio gvidita de kapitano Perogordo kiel reprezentanto de la Reĝo. Tie oni prenis la decidon ke la kongreso de la sekva jaro okazu en Parizo.

Inter la novaj E-grupoj de nia lando indas mencii tiun fonditan en Melilla jam en la monato januaro.

La jaro 1914 komencis sub tiel bonaj aŭspicioj por Esperanto kiel la antaŭaj. La 28-29an de junio okazis en Sant Feliu de Guixols la kvina kongreso de Kataluna Esperanta Federacio kun siaj kutimaj "Floraj Ludoj".

Komence de la monato aŭgusto la stratoj de Parizo varmis je esperantistoj venintaj tien por ĉeesti la dekan universalan kongreson de Esperanto. La 2an de aŭgusto en la kongresejo oni metis afiŝon komunikante al la miloj da kongresontoj la neokazigon de la kongreso: okazis katastrofo: estis komenciĝinta la UNUA MONDMILITO.